

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Dokumentaj kreditoj

La membroj kiuj pagis (kaj/aŭ antaŭpagis) minimume 5 jarkotizojn kaj la kotizon de la nuna jaro, aldone trovas sian ekzempleron de la ĵus tradukita ICC-regularo pri dokumentaj kreditoj. Aliaj ankoraŭ povas enordigi sian kotizpagon kaj ricevos la broŝuron kun la venonta numero. Por membroj kiuj aliĝis dum la lastaj jaroj, la nombro de pagitaj kotizoj estas indikita inter [krampoj].

La broŝuro ankaŭ aĉeteblas ĉe Flandra Esperanto-Ligo ([www.esperanto.be](http://www.esperanto.be), [butik\(a\)fel.esperanto.be](mailto:butik(a)fel.esperanto.be)) kontraŭ 9 eŭroj.

Ĉar la proceduro de dokumenta kredito, kvankam grava en internacia komerco, estas malbone konata, en ĉi tiu revuo aperas klariga teksto pri ĝi.

## IKEF-informkunveno dum la Universala Kongreso en Brazilo

Je redaktotino la dato kaj horo de la IKEF-informkunveno dum la UK ne estis konataj. Kongresantoj petu ilin de la prezidanto.

## Enhavo

Administrado - Novaj membroj - Novaj adresoj	3
Komercaj anoncoj	4-5
Ĉefio: Per librotenado pli proksime al Eŭropo	6-7
Dokumentaj kreditoj	8-9

---

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF:** S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi.

**Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo:** Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado:**

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: [rotsaert\(a\)esperanto.be](mailto:rotsaert(a)esperanto.be).

La jara **membrokoto** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj:**

- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*  
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB, IBAN: BE14 0001 5926 2983)

**Perantoj**

**Internacie:** Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.esperanto.be](mailto:financoj(a)fel.esperanto.be))  
**Ĉinio:** S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

**Francio:** S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efikso\(a\)aol.com](mailto:efikso(a)aol.com)

**Germanio:** S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto [f.j.braun\(a\)t-online.de](mailto:f.j.braun(a)t-online.de)

**Hungario:** D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

**Italio:** D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto [g.polerani\(a\)tiscalinet.it](mailto:g.polerani(a)tiscalinet.it) (poŝta konto 37485208)

**Japanio:** S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto [syama\(a\)dokkyo.ac.jp](mailto:syama(a)dokkyo.ac.jp) (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

---

### **Spezokonto kaj bilanco pri la jaro 2001**

Je 28 aprilo 2002 la revizoro, d-ro Polerani, skribis al la Prezidanto i.a.:  
'Mi trovis la kompletan kongruecon inter la ricevitaĵoj kaj la bilanco kaj  
spezokonto 2001: pro tio vi rajtas submeti tiujn ĉi lastajn al la aprobo fare de la  
membroj.' (rr)

### **Administrado**

Laŭ LM 76, paĝo 3 "Administrado - Grava atentigo al niaj membroj", membroj  
malakceptantaj la "Raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2001" kaj la "Financan  
Raporton 2001" estus devintaj tion fari per komuniko al la ĝenerala sekretario/  
prezidanto du monatojn post publikigo de LM 76. Neniu malakcepto alvenis ĉe mi. Do  
la raportoj estas akceptitaj. (fjb)

En la sama paĝo estis menciita la proceduro por (re)elekto de estraranoj. Laŭ la  
voĉdonoj ricevitaĵoj ĉe s-ro Gilbert, la estraranoj Braun, Kurz kaj Wang estas reelektitaj.  
(fxg)

### **Anoncita aranĝo**

Kinshasa, 26-28a de julio 2002: tri labortagojn pri la internacia lingvo Esperanto.  
Temo: 'La rolo de Esperanto en homara evoluigo kaj ĝia kontribuo en la lukto kontraŭ  
la malriceco en D.R.Kongo'. Ferdinand KINKANI, KER/Rilatulo, Konga Esperanto  
Rondo (KER/ONGD), B.P.6055, KIN6, Kinshasa Kalamu, rete [ker\\_ongd\(a\)yahoo.fr](mailto:ker_ongd@yahoo.fr)  
aŭ [emalanda\(a\)caramail.com](mailto:emalanda@caramail.com).

### **Nova membro**

320. S-ro Charles DONOGHUE, 165 Robin Lane # 310, Boone, NC 28607, Usono,  
rete [karloboone\(a\)earthlink.net](mailto:karloboone@earthlink.net)

### **Novaj (ret)adreso**

128. S-ro Josef ŜEMER [jshemer\(a\)attglobal.net](mailto:jshemer@attglobal.net)  
267. Olivier MOREAU, ul. Rosola 20 M 14, PL-02-786 WARSAWA, Pollando  
300. S-ro Emilo MALANDA NIANGA, Esperanto-Kultura Movado (EKM),  
103 Av. Ngina, Lemba 9, B.P.761, KINSHASA XI, Kongo (D.R.); rete: [emalan-](mailto:emalan-)

---

[da\(a\)caramail.com](mailto:da@caramail.com)

317. Philippe BERIZZI [pberizzi\(a\)lingaforce.com](mailto:pberizzi@lingaforce.com)

---

### **Nederlanda revuo 'Handelsbemiddeling' (Komerccperado)**

En Nederlando, Ĉambroj de Komerco eldonas la bultenon 'Handelsbemiddeling' en kiu oni publikigas komercajn petojn kaj proponojn. Respondecaj pri la eldono la regiona Ĉambro de Komerco de Meza Brabanto. Aliaj ĉambroj kaj organizoj sendas la el la eksterlando ricevatajn petojn kaj proponojn al tiu ĉambro, kiu kunordigas kaj publikigas ilin dekfoje jare.

Nun ankaŭ IKEF apartenas al la kontribuantoj.

Komercaj petoj kaj proponoj el La Merkato de nun estos tradukataj en la nederlandan lingvon kaj tiel atingos produktistojn kaj komercistojn tra tuta Nederlando.

Kvankam Esperanto do servos kiel utila pontlingvo, eventualaj respondoj de nederlandaj legintoj plejofte estos en alia lingvo (angle, germane, france, hispane aŭ nederlande). La angla plej verŝajnas. Ricevontoj mem zorgu pri tradukado kaj korespondado okazu en tiu sama lingvo. Se necese vi petu helpon de tradukisto.

IKEF aprezos, se ricevontoj mencias reagojn al LM por ke ni povu mezuri la rezultojn.

Inĝ. Kees RUIG  
konsilisto pri internacia komerco

### **Komercaj anoncoj**

IKEF senpage aperigas komercajn ofertojn, laŭ peto de membro aŭ de alia petanto. Tamen, ĝi ne kapablas kontroli la kvaliton de la ofertoj. Estas la respondeco de komercistoj laŭ kutimaj proceduroj esplori la fidindecon de la ebla nova partnero kaj/aŭ per specialaj teknikoj limigi la riskon.

### **Benino**

DZIDZOME FOO-COAMY fabrikas belajn zonotukojn kaj deziras eksporti ilin al Eŭropo kaj aliaj landoj. Retadreso [fdzidzome\(a\)caramail.com](mailto:fdzidzome@caramail.com).

### **Ĉinio**

\* Komputila monitoro: 15", 67 USD; 17", (ordinara ekrano) 83 USD, (ebena ekrano) 107 USD; kolora televido: 14", 50 USD, 21", 82 USD; ĉiuj prezoj CIF Hongkong.

---

S-ro WANG Tianyi (Ĉielismo), Verdstela Komerca Kompanio, tel: +86-29-2242215, fakso: +86-29-2232952, rete: [informo\(a\)komerco.com](mailto:informo@komerco.com), [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco@public.xa.sn.cn).

\* Ni proponas eksporti jenajn varoj kun bona kvalito kaj favora prezo:

1. Diversaj vestoj: jako, ĉemizo, T-ĉemizo, pantalono, kalsoneto, mamzono, piĝamo, korsajo, ktp.
  2. Familiaj elektraĵoj: televidilo, CD, Video CD, videoregistrilo, magnetofono.
  3. Komunikado: telefono, senfadena telefono, mobila telefono.
  4. Komputiloj kaj ties garnituro.
  5. Nutraĵoj: teo, mielo, kaŝtano, arakido, ginko, lilio kaj ties produktoj.
- Petu detalajn informojn. Ni ankaŭ volas servi kiel agento en la komercado kun Ĉinio. Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan; tel./fakso: +86-376-8821553, reto [deodaro\(a\)pub.xaonline.com](mailto:deodaro@pub.xaonline.com).

\* S-ro Donghai Cao, retadreso [caodonghai2001\(a\)yahoo.com.cn](mailto:caodonghai2001@yahoo.com.cn), ofertas parafinon, kandelojn, produktaĵojn de kemia industrio, teksaĵojn, vestojn, mielon, ktp.

\* Nia prezo (sen pakumo, USD/500g) por verda teo "XINYANG MAOJIAN" klaso: A 184.00 B 110.00 C 74.00 D 43.00 E 30.00 F 22.00 G 15.00 H 12.20 I 8.60 J 6.10 K 2.00. Ni ofertas ankaŭ pakitajn teojn en pli ol 10 pakaj formoj. La tarifon ni sendos laŭ via peto. Zhang Xuesong, retadreso [turismo\(a\)371.net](mailto:turismo@371.net), Xinyang, Henan.

### **Kongo**

S-ro Emilo MALANDA NIANGA, Esperanto-Kultura Movado (EKM), 103 Av. Ngina, Lemba 9, B.P.761, KINSHASA XI, rete: [emalanda\(a\)caramail.com](mailto:emalanda@caramail.com), por grupo de E-istoj el KONGO serĉas seriozajn eksterlandajn investistojn en:

- agrokulturo kaj bredado;
- transportkomerco pri veturilegoj por varoj kaj pri aŭtobusoj por personoj;
- aĉeto kaj vendado de diversaj artaĵoj;
- starigo de radio-televido-stacio;
- vendado de veturiloj kaj vestaĵoj (eĉ brokantaĵoj).

### **Niĝerio**

Mi estas komerca peranto el Niĝerio, kaj planas baldaŭ viziti Ĉinion. Mia niĝeria ne-esperantista kunlaboranto volas tuj importi paperajn nutraĵajn pak-materiojn (ekz. tia kian oni uzas por hakviandaĵo aŭ rostsandviĉo), kun la nomo de la aĉetonta kompanio presita sur ilin. Kiu interesiĝas? Ankaŭ ĉiumonate ni volas importi la jenajn nutraĵajn aldonajojn laŭ la indikitaj kvantoj: senkrema pulvora lakto (ADI extra grade)

---

28.000 kg, sorbic acid 3.000 kg, sodium sulfate 4.000 kg, sodium tripoly phosphate 1.000 kg, creamodan sim veg., 1.500 kg, instant yeast (dry) 5.000 kg, pimento (ground) spice 100 kg, calcium propionate 750 kg, ground cinnamon 100kg, citric acid (granulated) 700 kg. Kontakto: Olubunmi Gabriel OSHO-DAVIES, [oshodavies@yahoo.com](mailto:oshodavies@yahoo.com).

---

### **Ĉeĥio: Per librotenado pli proksime al Eŭropo**

La traktado pri aliĝo de kandidat-landoj al Eŭropa Unio proksimigas al fino. Ĉeĥoj esperas, ke ĝis la fino de la nuna jaro ĉiuj pritraktataj ĉapitroj estos aprobitaj kaj ekzistos plu neniu baroj por la akcepto de Ĉeĥa Respubliko al EU.

Unu el la ankoraŭ nefaritaj ĉapitroj estas la financaj kaj buĝetaj reguloj. Konforme al tio la ĉeĥa parlamento akceptis amendon al leĝo pri librotenado n-ro 563 el la jaro 1991. Dum dek jaroj la leĝo estis amendita kvarfoje, el kio la lasta amendo ekvalidis la 1an de januaro 2002. La celo de tiu ĉi amendo estas pliproksimigi la leĝon n-ro 563/1991 al la Internaciaj Kontad-Normoj (*International Accounting Standards*, <http://www.iasc.org.uk>).

Per la leĝo pri librotenado estas determinataj jenaj problemoj:

1. la temo de kontado, la kontad-periodo kaj la devoj de kontotenaĵoj, ekz. konti proveble, komplete kaj laŭvere,
2. la kontad-sistemoj, la kontaj dokumentoj, la kontaj enskriboj kaj kontaj libroj, precipe la manieroj de malfermado kaj fermado de kontolibroj,
3. la jarfina kontofermo, la etatoj, la aprobo de kontad-fermo fare de kontrolisto kaj la jarraporto,
4. la manieroj de prez-taksado,
5. la inventarado de havoj kaj de ŝuldoj kaj la metodoj de inventarado,
6. la enarkivigo de kontodokumentoj,
7. la komunaj disponoj, kiel pri la proveblo kaj transigo de konta enskribo, korektoj kaj ceteraj disponoj pri kontaj enskriboj kaj pri punpagoj.

La 1an de januaro 2002 komencis validi ankaŭ la Dispozicioj de Ministrejo de Financoj n-ro 281/89759/2001, kiuj fiksas la kontprojekton kaj la procedojn de kontado por entreprenistoj. La dispozicioj estas publikigitaj konforme al la § 4, alineo 2, de la leĝo n-ro 563/1991 pri librotenado.

La kontprojekto por entreprenistoj enhavas jenajn dek kontoklasojn:

- |  |  |
|--|--|
| 0 - Longtempa havo (ĝis la fina de la 2001-a jaro ĝi estis Investo-havo) | 4 - Kapitalkontoj kaj longtempaj devoligoj |
| 1 - Provizoj   | 5 - Kostoj                                 |
| 2 - Financaj kontoj  | 6 - Gajnoj                                 |
| 3 - Reguligaj rilatoj  | 7 - Fermaj kaj subilancaj kontoj           |

---

8 - Intern-entreprena kontado

9 - Intern-entreprena kontado

La unuopaj konto-klasoj dividiĝas je duciferaj kontogrupoj kaj je triciferaj sintezaj kontoj. Por ekzemplo la kontoklaso 1 - Provizoj dividiĝas jene:

11 - Materialo (t. e. krudaĵoj, helpmaterialoj/farboj, lubrikaĵoj, purigaĵoj, vicpecoj, pakmaterialoj, ktp.),

111 - Prizorgado de materialo, 112 - Materialo en stoko, 119 - Materialo survoje

12 - Provizoj de propra produktado,

121 - Nefinfaritaj produktoj (t. e. ne plu materialo, sed ankoraŭ ne finitaj produktoj),

122 - Propraj duonfabrikaĵoj, 123 - Produktoj, 124 - Bestoj (ekz. junaj bredbestoj, grasigitaj bestoj, peltbestoj, fiŝoj, abelaroj, kortbirdoj, hundoj, ktp.),

13 - Varoj (t. e. objektoj por vendo),

131 - Prizorgo de varoj, 132 - Varoj en stoko kaj en vendejoj,

139 - Varoj survoje... ktp.

La triciferaj sintezaj kontoj povas esti dividataj je plurciferaj analizaj kontoj, ekz. 112 - Materialo en stoko je 11201, 11202, 11203... laŭ unuopaj materialspecoj (sortimento), konforme al antaŭpreparita konto-listo, kiun ĉiu kontad-unuo devas havi inter siaj librotenaj dokumentoj kaj kiu devas esti kongrua al la kontprojekto.

Krom tio la Dispozicioj enhavas detalan priskribon de procedoj de kontado por entreprenistoj. Tien apartenas ekz. determino de iuj terminoj de la kontprojekto, vidpunktoj por formado de analizaj kontoj, procedoj de jarkomenca malfermado kaj jarfina fermado de analizaj kontoj, principoj de kontado de kostoj kaj gajnoj kaj de ilia laŭtempa disdivido, kontado de impostaj kostoj, principoj de formado kaj uzado de rezervoj, kontado de korektaj eroj, de kurzaj diferencoj, de diferencoj de inventarado, de valorpaperoj kaj kambioj, de bonhavo post pagotempo kaj detalaj instrukcioj al unuopaj kontoklasoj.

La cititaj Dispozicioj pri la kontprojekto kaj la procedoj de kontado por entreprenistoj validas por juraj personoj, kiuj entreprenas laŭ leĝo n-ro 513/1991, Komerca kodo, kaj por fizikaj personoj, kiuj estas kontad-unuoj kaj kontas laŭ duobla librotenado.

Por bankoj, asekurejoj kaj aliaj financaj institucioj, por organizaj komponantoj de la ŝtato, por administraj teritoriaj unuoj, por subvenciataj organizaĵoj kaj por neprofitaj

---

organizaĵoj validas aliaj kontprojektoj kaj procedoj de kontado.

Jiří Patera

---

## **Dokumentaj kreditoj**

Dokumenta kredito (ankaŭ: akreditivo, kreditletero, *letter of credit*) estas nemalhavebla ilo por sekurigi la pagon de liveritaj varoj, uzata en internacia komerco, kiam oni komercas kun ne jam konata partnero. Eĉ spertaj komercistoj ofte ne konas tiun proceduron. Jen baza klarigo:

Per dokumenta kredito aĉetanto de varoj aŭ servoj disponigas monsumon ĉe sia banko aŭ ĉe la banko de sia liveranto. La liveranto nur povas disponi pri tiu monsumo post kiam li prezentis dokumentojn, preskribitajn en la kredito, kaj krome plenumis ĉiujn aliajn kondiĉojn menciitajn en la kredito.

Kutime estas kvar partioj koncernataj:

- La petanto (la importanto, angle *applicant*), kiu donas al sia banko instrukcion por malfermi dokumentan krediton;
- La emisianta banko (angle *issuing bank*), kiu malfermas la krediton kaj sendas ĝin al la avizanta banko;
- La avizanta banko (angle *advising bank*), kiu ricevas la krediton de la emisianta banko kaj laŭ la specifitaj kondiĉoj disponigas ĝin al la beneficulo;
- La beneficulo (la eksportanto, angle *beneficiary*) kiu prezentas la preskribitajn dokumentojn kaj ricevas la pagon.

La emisianta banko pro la dokumenta kredito havas kontraktan ligan kun la aĉetanto kaj la liveranto. Nur tiu emisianta banko havas nerevokeblan pagdevon rilate al la liveranto. (Teorie la pagdevo povus esti revoklebla, sed tia garantio apenaŭ havas utilon kaj praktike revokebla kredito ne ekzistas.)

Por havi pli da pagsekureco, eblas ke la liveranto postulas konfirmon de la dokumenta kredito. Tio signifas ke ankaŭ la avizanta banko (kutime la banko de la liveranto) nerevokeble devontigas sin pagi.

Praktike la transakcio per dokumenta kredito okazas en 11 paŝoj:

1. Aĉetanto kaj vendanto kontraktas kaj decidas fari la pagon per dokumenta kredito.
2. La aĉetanto donas instrukcion al sia banko por malfermi dokumentan krediton. Tiu banko iĝas la emisianta banko.
3. La banko malfermas la krediton kaj transdonas ĝin al la banko de la aĉetanto, la avizanta banko.
4. La avizanta banko avizas, sen aŭ kun sia konfirmo, la krediton al la vendanto.

5. La vendanto sendas la varojn, konforme al la kondiĉoj de la kredito.
6. La vendanto transdonas la preskribitajn dokumentojn (kiuj pruvas la sendon de la varoj) al la 'negocanta' banko (kutime, se ne nepre, la avizanta banko).
7. La negocanta/avizanta banko kontrolas la dokumentojn kaj kompensas la vendanton laŭ la preskriboj de la kredito.
8. La negocanta/avizanta banko sendas la dokumentojn al la emisianta banko.
9. Se la negocanta/avizanta banko pagis, la emisianta banko aranĝas repagon al ĝi (angle: *reimbursement*).
10. La emisianta banko kontrolas la dokumentojn, prenas la valoron de la konto de la aĉetanto kaj sendas la dokumentojn al li.
11. Per la dokumentoj la aĉetanto kapablas akiri la varojn.

Ekzistas multaj variantoj. Ekzemple eblas ke la pago ne okazas tuj, sed ke la bankoj devontigas sin al pago je iu difinita dato post la prezento de la dokumentoj (prokrastita pago).

(rr, laŭ retpaĝaro de ABN-AMRO-banko)

## **Kelkaj opinioj pri komerco kaj Esperanto**

1. Ni, esperantistaj komercistoj, devas agi laŭ reguloj pri internacia komerco kaj starigi fidon. Sen fido fari aferon esti malfacila kaj ne eblos sukceso.
2. Se oni provizas informojn kaj varajn prezojn, tiuj devas esti veraj.
3. Nun oni multe uzas reton, fakson, telefonon. Tiuj estas pli rapidaj kaj estas tre bonaj korespondiloj al komercistoj.
4. Se venas iu letero, la ricevanto devas sen prokrasto respondi.
5. Komercisto, ricevinte la mонденon, devas bone fari fine ĉion, ĝis la mendanto ricevis varojn.
6. Kiam peranto serĉas varojn por mendanto, li devas indiki ke la prezoj estas 'el fabriko'. Al tiu baza prezo oni ankoraŭ devas aldoni transporton, doganon, imposton, asekuron, registar-permeson, servojn... kiuj altigas la prezon. La peranto helpu por akiri tiujn kosto-elementojn. La mendanto, ĉion finkalkulinte, devos juĝi ĉu estas bona transakcio.
7. Ambaŭ flankoj devas sincere kaj zorge agi. Speciale esperantistaj komercistoj, membroj de IKEF, observu la regulojn, ne misuzu fidon kaj ne faru ion malbonan.
8. Esperantistaj komercistoj devas altigi sciojn pri Esperanto. Se la scioj estas malaltaj, komerco estas malfacila.
9. Perantoj ofte ne havas multe da mono kaj ne kapablas sendi varojn al aĉetanto sen

---

antaŭpago. Oni pritraktu tiun problemon dum la preparo de la negocado.

Chen jinyin (Chen Dinshu), IKEF 302, [gemidolf100128\(a\)sohu.com](mailto:gemidolf100128(a)sohu.com)



### **Merkatada defio tutmonda**

NSE (Nu Skin Entreprises) estas kvotata en la Novjorka Borso (NYSE - sub la kodo NUS) kaj havos baldaŭ 40 oficejojn tra la mondo. Ĝi i.a. subtenas la Olimpikajn Ludojn kaj estas finance tre stabila. Kvankam usondevena, ĝi sekvas rigoran kosmopolitan lingvopolitikon - de ĉinaj lingvoj ĝis la islanda!

### **Jam interretaj komercaj paĝoj en Esperanto**

Iia internacia trejnado pere de Interreto ja konsulteblas en dekoj da lingvoj - kaj Esperantaj informpaĝoj paŝon post paŝo ekestas! Vidu ĉe [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) (kaj alklaku la ligon "NuSkin, Pharmanex kaj BigPlanet en Esperanto") aŭ [www.newbusiness.mybigplanet.com](http://www.newbusiness.mybigplanet.com) .

La komerca projekto ne estas rekte ligita al Esperanto. Ĝi tamen povas alporti allogajn enspezojn al diversaj Esperanto-rondoj. IKEF povus tie ludi esencan rolon, se ĝiaj entreprenemaj membroj ekaktivis - ĉu por si mem, ĉu por sia klubo aŭ asocio. Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kunordigas la tuton, kaj jam por si mem arigis ĉiuspecajn makleraĵojn por ke ĝi estonte estu malpli dependa de ŝtataj subvencioj.

Kun jam tre forta pozicio en Ameriko kaj Azio, la firmao NSE baldaŭ pli



---

grandskale ekaktivis - en Eŭropo ekzemple ne malpli ol 20.000 partneroj estas bezonataj! Temas pri efika teama laboro parttempa, merkato kaj komunikado en dinamikaj komercaj sektoroj: altkvalitaj ĉiutagaj produktoj - tiom fidindaj ke 100 % garantio validas!

La sub-firmao Pharmanex kombinas pintan sciencan kun naturaj tradiciaj sanrimedoj (i.a. kun Ajurveda bazo). Tria komerca branĉo estas dinamika interreta komerco pere de BigPlanet. Rigardu ekzemple la esperantlingvaj retpaĝoj pri la algluebla anteno aŭ pri sunbaterio por Nokia-telefonoj. Ankaŭ tre allogaj inventaĵoj ekologiaj troveblas en BigPlanet.

### **Konkrete eklanĉo**

Dum la startperiodo Anne Tilmont eklanĉas konkrete la Esperantan Projekton: starigi propran komercan grupon kun aktivaj kunlaborantoj (preskaŭ) ĉie ajn en la mondo - cele al interesaj vivrimedoj por si mem kun parttempa aŭ plentempaj laboroj kaj kun aŭtomata profito por la Esperanto-movado. Inter 2 kaj 12 aktivaj horoj semajne jam eblas.

Se ni sukcesos dinamike ekstarti, post kelkaj monatoj (du jaroj estas normale celataj por la stabiligo) la enspezoj komencos sisteme kreski, kreski, kreski...

Informo konkreta ĉe:

S-ino Anne TILMONT  
Cité des Carrières 10  
1430 REBECQ - BELGIO  
Telefono 00 32 67 63 79 74, fakso 63 81 37, rete [atilmont\(a\)xs4all.be](mailto:atilmont(a)xs4all.be)

Noto: Mi persone emfazas - pro propra sperto - ke kaj la firmao mem, ĝia labormaniero (komerca kaj scienca) kaj ĝia etiko estas fidindaj. Tamen ne eblas en 3000 literoj klarigi ĉion kion ni dum plena "komerca enkonduko" detale traktas. Mi laŭvole informos pri aktiva aŭ pasiva apogo. Por pli

---

foraj regionoj forta interreta apogo kaj trejnado eblas. Via kasisto Roland Rotsaert persone ĉeestis la bazan komercan enkondukon kaj juĝis ĝin sufiĉe interesa por aperigi tiun-ĉi artikolon: do ne hezitu almenaŭ informi-ĝi ĉe mi. (at)

---

### **Aŭstralio inundita de ĉinaj turistoj**

Laŭ raporto de BBC-radio (30 majo 2002), la turisma sektoro de Aŭstralio ne sukcesas bone akcepti la multajn ĉinajn turistojn. Ĉinoj nur al kelkaj landoj povas turismi sen komplikaj formalajoj; Aŭstralio estas unu el tiaj landoj kaj tre ŝatata de ĉinoj. Tamen, nur malmultaj personoj en Aŭstralio parolas la ĉinan kaj pro striktaj laborreguloj ne eblas dungi pli da ĉinlingvanoj. Tial la aŭstraliaj turismaj oficejoj estas devigitaj limigi la nombron de ĉinaj turistoj kiujn ili akceptas. Pro la bona ekonomia situacio en Ĉinio, la problemoj dum la venontaj jaroj priakriĝos. (rr)

### **Radio Havano Kubo**

La elsendoj estas aŭskulteblaj interrete per la servilo de Aŭstria Radio ([http://roi.orf.at/esperanto/es\\_demand.html](http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html)), sed daŭras la elsendoj per mallongaj ondoj:

- Eŭropo: dimanĉe, 19.30 UTC, 21 m, 13715 khz

- Ameriko: dimanĉe, 15.00 kaj 23.30 UTC, 25 m, 11760 khz

Konfirmu la ricevon rete je: [radiohc\(a\)ip.etecsa.cu](mailto:radiohc(a)ip.etecsa.cu).

---

### **Negoco**

Kiu malbonajn varojn vendas  
Tiel malbonajn signojn sendas;  
Kun li ne plu negocus oni,  
Averton ni ĉiuj devas soni  
Por ke aliaj ne kaptiĝu.

Kiu dum komercado trompas  
Tiel esperon de iu rompas!  
Se li tiel gajnon akiras  
Al tiu samtempe aliras  
L'averton: 'NE NEGOCU KUN LI'

Jen la leĝo de reciproko:  
Kiu vendas pecojn de roko  
Ricevus la monon el ŝtono;  
Por esti pagata per mono,  
Oni vendu kion oni petas.

© Bunmi OSHO-DAVIES (2002.05.17)